

Edmond Privat : *Interpopola Konduto*
Antaŭparolo, Animo nacia
Claude Gacond, 373-a radioprelego, 1970.12.02 & 05

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Pluraj geaŭdantoj esprimis la deziron foje aŭdi erojn el la libro **Interpopola Konduto** de Edmond Privat, kiu estas delonge elĉerpita. Dum tiu ĉi vintro ni turnos nian atenton al tiu verko, kies temo restis bedaŭrinde ege aktuala.

A.- Kiel Edmond Privat skribas en averto :

Cl.- *Tiu ĉi libro estas frukto de multjara observado. [...] La celo ne estis esprimi partian opinion, sed ekzameni faktojn sur psikologia kampo ne sufiĉe atentata.*

A.- Fino de la citaĵo. Edmond Privat celis sciencan observadon de faktoj, eĉ se tiu observado lumigas faktojn, kiuj ĝis 1931 kaj eĉ ĝis nun tendencas esti ignorataj aŭ silentataj. Pri la temo kaj celo de **Interpopola Konduto** Edmond Privat ankoraŭ skribis :

Cl.- *Kiuj ŝatas insultojn, tiuj ne legu ĝin. Ili ne trovos ion por nutri pasion. Ne ofendi, sed pripensigi, jen la intenco : Kiel homoj kondutas de nacio al nacio ? Kiel ili sentas are ?*

A.- Fino de la citaĵo. La **Antaŭparolo** alportas aliajn interesajn klarigojn pri la intencoj de Edmond Privat. Jen citado el tiu **Antaŭparolo**, kiu memorigas la spiritostaton de la biografo de Zamenhof :

Cl.- *Tiu ĉi libro montras observitajn faktojn. Verkinte pri la historio de polaj ribeloj kaj pri la slavaj nacioj batalintaj por libereco, la aŭtoro sidis kiel konsilanto ĉe kvar kunvenoj de la Ligo de Nacioj kaj notis siajn impresojn.*

A.- Edmond Privat daŭrigas : *Ĉiuj centjaroj aperigas kontrastojn. La XX-a estos ja vidinta du fortajn klopodojn en kontraŭaj direktoj : apartiĝo kaj kuniĝo de nacioj. Ambaŭ naturaj.*

Cl.- *En Azio kaj Afriko, kiel en Eŭropo, la popoloj emas al plena liberiĝo el fremda rego. Sendependaj ili fariĝas. Samtempe sian internacian vivon ili provas organizi. Tasko malpli facila !*

A.- *Sur la vojo al memrego klare brilas la baro : unu premanto kiel sola pafcelo. Kontraŭ ĝi fajras ĉiuj lumoj.*

Cl.- *Sur la vojo al federacio, malpli nete vidiĝas la baroj. En mallumo ĉiuflanke aperas ili. La plej grava nomiĝas : timo. Estas eĉ ne certe, ĉu oni ĉiam deziras antaŭen veturi.*

A.- Fino de la citaĵo. Edmond Privat poste esprimas la opinion, ke la kredoj ludas gravan rolon en la interpopolaj konfliktoj. Ni ree citas lin :

Cl.- *La ekonomia flanko de tiu kontraŭeco (inter memrego kaj federacio) ricevis abundan studon. Ankaŭ la politika. Eĉ la jura. Sed restas alia flanko malpli esplorita. Estas tradicioj, moroj, hereditaj ideoj, kolektivaj emocioj, vasta reala mondo ne pli forgesinda ol la mondo de ciferoj. La vivo miksas ĉion, enligas ĉion en sia konstanta fluo.*

A.- *Por ekkompreni tion, kio okazas en Azio kaj Afriko aŭ en Okcidento, necesas aŭdi, kion la homoj manĝas tie, kion ili gajnas. Necesas ankaŭ aŭdi, kion ili kredas.*

Cl.- Fino de la citaĵo. De 1931, jaro kiam Edmond Privat verkis la francan tekston de **Interpopola Konduto** sub la titolo **Le Choc des patriotismes [La koliziado de la patriotismoj]**, ĝis hodiaŭ, la situacio ne multe evoluis. Oni eble pli bone scias, kion la homoj manĝas, kion ili gajnas. Sed ĉu oni multe esploris, kion ili kredas ?

A.- La unua ĉapitro de **Interpopola Konduto** pritraktas la temon **Animo Nacia**. Por aktualigi la dirojn de Edmond Privat ni nin permesis aldoni la nomon **Afriko**, kiam li mencias **Azion**

Edmond Privat : *Interpopola Konduto*
Antaŭparolo, Animo nacia
Claude Gacond, 373-a radioprelego, 1970.12.02 & 05

kaj ni anstataŭos la nomon **Ligo de Nacioj** per tiu de **Unuiĝintaj Nacioj**. Ni havis la okazon lin aŭdi tion fari dum prelego pri mondfederismo. Do ni estas certaj neniel perforti lian penson.

Cl.- Jen ni citas al vi la komencon de la ĉapitro **Animo Nacia** :

A.- *En la dudeka centjaro post Jesu-Kristo, Azio kaj Afriko pruntas el Okcidento ties ĉefan kredon.*

Cl.- *Ne kristanismo ĝi estas, sed naciismo. Tiu kredo rigardas la ŝtaton kvazaŭ korpon kaj la patrujon kvazaŭ animon.*

A.- *Oni povas imagi la unu sen l' alia. Trudita kreaĵo politika, jen korpo sen animo. Premata nacio, jen animo sen korpo.*

Cl.- *Unuiĝintaj Nacioj ekzistas tiom, kiom ekzemple la Svisa Konfederacio. Sed unu estas nova kaj serĉas animon. L' alia forĝis la sian tra centjaroj.*

A.- *Polujo persistis pli ol centjaron kvazaŭ sen korpo aŭ pli vere sur ĉerko de krucumito. Ĝia volo vivi renaskis ŝtaton.*

Cl.- *Neniam ĉesis la homoj krei por si diojn laŭ bildo de si mem. Nenia homa organizo kreskas sen ia mistiko.*

A.- *Ĉirkaŭ limŝtono flugetadas papilio de floro al floro. Ĝi ne suspektas landlimon ignoratan de naturo. Sed la homoj havas propran historion kaj memoras pri ĝi.*

Cl.- *Ili vivas en gentoj. Unua patrujo de l' infano estas la patrino. El ŝi li apartiĝas kun timo, kaj ekkonscias malrapide pri ekzisto sendependa. Kiam li akiris tiun iluzion, li jam devas ĝin perdi.*

A.- *Unue familio. Poste patrujo. Al ĝi li devas reporti la filan amon kaj la sopiron al varma rifuĝejo.*

Cl.- *Se venas milito, li devos al la patrujo la vivon mem oferi. Laŭ tiu mezurilo jam li komprenas, ke tio estas la ĉefa religio ĉirkaŭ li.*

A.- *Kiu kredo plej multe postulas, tiu plej multe gravas.*

Cl.- Fino de la citaĵo. La venontan semajnon ni daŭrigos la legadon de tiu pripensiga libro **Interpopola Konduto** verkita de Edmond Privat antaŭ 40 jaroj.

A.- Tiu verko vin eble helpas pli bone kompreni la nunajn interpopolajn okazaĵojn.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-